

# esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 3/2004

Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Junio 2004

Look inside for:

<b>Kion faras Ionel?</b>	<b>2</b>
<b>Boris Kolker</b>	<b>3</b>
<b>Mez-Usona Regiono</b>	<b>4</b>
<b>Volontuloj</b>	<b>5</b>
<b>El la "Verda Biblio"</b>	<b>6</b>
<b>Novaj Libroj</b>	<b>7</b>
<b>Korespondantoj</b>	<b>10-11</b>

We recommend joining the following two mailing lists by sending a blank message to the given address:

Announcements from ELNA:

**elna-anoncoj-subscribe@yahoogroups.com**

Discussions among members of ELNA:

**elna-members-subscribe@yahoogroups.com**

## **NOREK: Nord-okcidenta regiona Esperanto-kongreso**

NOREK has been an annual regional Esperanto conference since 1981. It attracts both Canadian and U.S. Esperantists and has been hosted by the Canadians for the last few years. This year's NOREK 2004 will be hosted South of the border in Boise, Idaho September 10-12.

Boise is a growing City with a metropolitan population of almost 400,000. It is situated between the high desert and the foothills of the Salmon range of the Rocky Mountains. The Boise River provides a cooling and refreshing band of green cottonwoods. The Greenbelt provides about 26 miles (over 40 kilometers) of paved walkways along the Boise River for walking, running or bicycling and for access to bird- and wildlife-watching areas.

There are no guarantees, but usually the weather in September is excellent with warm days and cool evenings, so bring a jacket for early-morning or late-evening strolls along the Greenbelt or through one of the many parks, including one that is within a half-kilometer of the hotel.

Activities in September include live outdoor theatre (Shakespeare Festival), Art In the Park, and live out-door opera. Other attractions include the Old Idaho Penitentiary (see how prisons have evolved!), Idaho Historical Museum, Idaho Mining Museum, Idaho Botanical Garden, Rose Garden, Zoo Boise, the Basque Museum (Boise has the largest Basque population outside of the old country), Snake River Birds of Prey, Bruneau Sand Dunes and Observatory, 22 public golf courses, and the only blue football turf in the world! All

this is within an hour of the hotel!

Art in the Park takes place during the weekend of September 10-12. It is a major fund-raiser for the Boise Art Museum and will have 250 artists and craftspeople from all over the west to exhibit and sell their crafts. There is a lot to see and buy and eat. Each year we begin our Christmas shopping at this event.

Within a short distance from the hotel, some within walking distance, are lots of restaurants and some local breweries.

In the Boise River people can be seen fly-fishing, kayaking, and floating the river on tubes, rafts, etc., although it may be a little cold by September to float the river.

If you want to extend your visit to do some sight-seeing, there are several well-known destinations, such as Yellowstone National Park (about 8 hours), Grand Teton National Park (next to Yellowstone), Craters of the Moon National Monument (about 4 hours), Shoshone Ice Caves (about 4 hours), Sun Valley Resort (about 3 hours), and McCall Resort area (about 3 hours).

Come to Boise to practice your Esperanto at the 24<sup>th</sup> NOREK and stay for the many other activities and sights. This year's conference theme is Human Rights (Homaj Rajtoj). We especially invite beginner (new) Esperantists as we plan to have a lesson using *Pasporto al la Tuta Mondo* as well as some activities for "komencantoj". So bring your family members and show them why you are an Esperantist and introduce them to Boise and the Treasure Valley. See our web site at <http://terpomuloj.org> for more details.

Esperanto League for North  
America  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO  
☎510/653-0998; ☎510/653-1468  
✉elna@esperanto-usa.org

*President/Prezidanto:* Alexander Shlafer  
*Vice President/Vicprezidanto:* Phil Dorcas  
*Secretary/Sekretario:* Ellen M Eddy  
*Treasurer/Kasisto:* William B Harris  
*Other Board Members/Aliaj estraranoj:*  
Thomas Alexander, Joel Amis, Anna  
Bennett, D Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi  
Harmon, Orlando E Raola, Jacob  
Schwartz, Tim Westover

*Director, Central Office/Direktoro de la  
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky

### esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the  
Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de  
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 40, No. 3  
ISSN 1056-0297  
*Editor/Redaktoro:* Don Harlow  
☎510/222-0187; ☎510/653-1468  
✉ donh@donh.best.vwh.net

Materials for esperanto usa should be  
sent to/Materialojn por esperanto usa  
oni sendu al:

### esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO  
or by e-mail/aŭ retroŝte al:  
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin  
are those of the authors, and don't  
necessarily represent the point of view  
of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-  
itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj,  
kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de  
ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is  
permitted, provided that due credit is  
given, and a copy of the reprinted materi-  
al is sent to ELNA/Estas permesate  
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,  
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj  
ke oni sendu ekzempleron de la repu-  
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2004/5 Limdato por  
numero 2004/5: 30.10.2004

# LA ELDONISTO DE OZ EL LA LANDO DE DRAKULA

## El *Familia Esperanto* n-ro 44 (neregula cirkulaĵo de "Rondo Familia")

Tiuj, kiuj vizitis la lastajn du  
UK-jn kaj kadre de ili la libroservon  
de UEA, renkontis tie bukloharan,  
barban sinjoron. La vizitintoj de la  
CO en Roterdamo kontaktis lin en  
la Libroservo. Plej multaj tamen  
rilatis kun li pere de liaj libroj – la  
eldonaĵoj de BERO.

Ionel Onet naskiĝis en Calatele,  
Transilvanio (Rumanio). Eĉ se li  
studis en Informadika Liceo kaj  
poste en Politeknika Universitato  
en Cluj, ekde sia infanaĝo li inklinis  
al humanismaj sciencoj kaj al  
lingvoj.

Kiam li kiel 13-jara alvenis en  
la urbon, subite ĉiu kvara homo  
ĉirkaŭ li parolis ne la rumanan, sed  
la hungaran, la germanan aŭ la  
ciganan. En la lernejo aldoniĝis al  
la lingva mondo de la knabo la  
franca kaj la angla.

La renkontiĝo kun Esperanto  
okazis en 1981. Jam konatiĝinta  
kun programitaj lingvoj Ionel  
rigardis ĝin skeptike, sed li tre  
rapide konsterniĝis pri sia  
antaŭjuĝo, ĉar ene de kelkaj horoj  
venis enamigo en ĝin.

"Mi bezonis tutan nokton por  
lerni la gramatikon kaj la sekvan  
tagon mi jam skribis al UEA," li  
rakontas.

1984 — pro siaj malkonformaj  
opinioj pri la oficiala politiko de sia  
lando Ionel perdis ĉiujn rajtojn. Li  
ne rajtis labori nek studi.

En 1988 Ionel finfine sukcesis  
fuĝi el Rumanio — danke al Espe-  
ranto. Kiel? "Provante forlasi la  
landon mi vizitis ĉiun ambasadejon.  
La belga ambasadoro diris al mi, ke  
se mi ricevos laborpermeson, li  
donos al mi vizon. Mi kuris al la  
telefono kaj telefonis al Nederlando,  
petante helpon de Simo Milojeviĉ.  
Post kelkaj monatoj venis  
invitletero al Usono de Gigi  
Harabagiu. Preter mia scio ili du  
komplotis kaj fakte savis min."

En 1990 aperas sur la

libromarkato nomo de nova  
eldonejo: BERO. "BE" ĉar la  
kunfondinto venis el Bermudoj,  
"RO" signis la devenlandon de Ionel.  
Post la unua kune eldonita verko la  
Bermuda esperantisto revenis al sia  
lando, sed la eldonejo ne ĉesis  
funkcii. Ĝi havas ĝis nun 40  
eldonaĵojn, ĉiujn aŭ en Esperanto,  
aŭ pri Esperanto kaj ĝenerale  
verkojn de malgrandaj kulturoj. Ni  
konatiĝu kun kelkaj el ili:

Eble la plej fama verko de BERO  
eldonita estas *La mirinda sorĉisto de  
Oz*, porinfana rakonto de L. Frank  
Baum. "Mi ĝuis ĝin en mia denaska  
lingvo, kial aliaj infanoj ne ĝuu ĝin  
en nia komuna lingvo?!" — jen la  
kialo por eldoni. Oz aperis okaze de  
la 100-jara datreveno de sia 1-a  
eldono, en 2000. Honore al la jubileo  
la libro enhavis la originalajn  
ilustraĵojn de W. W. Denslow.

La amuza porinfana rakonto de  
James Thurber, *La 13 horloĝoj*,  
estas tre populara en la anglalingva  
medio. La ege vortludan tekston  
tradukis Ralph A. Lewin.

Ĉar inter la am-pasioj de Ionel  
estas ankaŭ folkloro, li eldonis la  
originale en Esperanto verkitajn  
folklorecajn rakontojn de "Doko" (D-  
ro David K. Jordan –DH) kun la titolo  
*Rakontoj prapatraj pri nia lando antaŭ  
multaj jarcentoj kiam okazemis aferoj  
mirindaj*. Ĉiuj tiuj rakontoj pri ni,  
esperantistoj, kaj pri nia historio  
estas surbendigitaj de la  
Sanfranciskaj kursaranoj. La  
materialo estas bone uzebla de  
instruistoj.

"Mi rimarkis, ke por etuloj kaj  
adoleskuloj estas eldonitaj multaj  
verkoj, sed tre malmultaj por  
puberuloj," jen unu bona kialo por  
aperigi la rememorojn de indiana  
tribestro Luther Standing Bear: *Mia  
Indiana knabeco*. La tradukinto de la  
ilustrita eldonaĵo estas William R.

**Daŭrigo ONET sur p. 11**

# NE BATALI KONTRAŬ, SED LABORI POR

## *intervjuo kun Boris Kolker okaze de lia 65-jariĝo*

*Ĉu vi povas rakonti pri via esperantistiĝo? Kiam kaj kiel ĝi okazis?*

Mi eksciis pri Esperanto komence de la jaro 1956, tra leginte en la ruslingva versio de la revuo *Pollando* artikolon de Isaj Dratwer "Pollando — patrujo de Esperanto". La artikolo kaj la ideo de Esperanto ege impresis min. Post multaj jaroj, kiam mi mem aŭtoris multajn similajn publikaĵojn, mi relegis tiun artikolon, kiu ĉi-foje impresis min kiel tute ordinara. La 30-an de novembro 1957 mi komencis reskribi en kajeron libreton de N.D.Andrejev kun koncizaj gramatikoj kaj vortareto de Esperanto. Tiun daton mi konsideras kiel la daton de mia esperantistiĝo. Post du monatoj mi organizis la unuan rondeton, kaj instruante lernis mem.

*Kiu estis la unua partoprenita de vi E-tendaro? Kio interesa okazis en ĝi?*

Mia unua tendaro estis la 2-a Balta Esperanto-Tendaro (BET) en Estonio en la jaro 1960. Tiutempe la homoj preskaŭ ne vojaĝis. Do mia vojaĝo Kiŝinĵov-Moskva-Tartu-Tallinn-Leningrad-Kiŝinĵov (kaj ĉieaj renkontiĝoj kun esperantistoj) aspektis kvazaŭ ĉirkaŭmonda. En la tendaro mi unuafoje aŭdis Esperantajn kantojn ("Esperanto estas la lingvo por ni" kaj aliajn), amikiĝis kun Hilda Dresen, unuafoje tradukis simplan kanteton kun mia samĉambrano Vitas Ŝilas kaj fondis la tradician Tendaran Universitaton per tri prelegoj pri interlingvistiko (kiujn mi verkis sub gvido de akademiano Paul Ariste). Ĉar vi estas kunfondinto kaj kungvidinto de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado), ĉu vi povas nomi iun daton, kiun oni povas konsideri kiel naskiĝdaton de tiu unua postmilita tutlanda sovetia E-unuiĝo?

Tio povas esti la 16-a de decembro 1965. Tiuvespere, post mia prelego en la Interlingvistika Sekcio de la Instituto de

Lingvoscienco, Vladimir Samodaj kaj mi sidis ĉe kafotaso en proksima kafejo, pridiskutis la ideon de Anatolo Gonĉarov kaj decidis krei tiun junularan organizaĵon.

*Vi estis la unua sovetia komitatano de TEJO, Ĉefdelegito kaj komitatano de UEA. Havante tiel grandan sperton de internacia agado kaj loĝante nun en Usono, ĉu vi plu sentas vin reprezentanto de la rusia esperantistaro?*

Mi ĉiam serĉas freŝajn fortojn en diversaj landoj por engaĝi ilin en Esperanto-aktivadon. Lastatempe mi kreskigas novajn verkistojn en mia Internacia Perfektiga Korespondanda Kurso (IPKK). Ĉar plej bone mi konas esperantistojn el Rusio kaj eks-Sovetio, mi klopodas promocii plurajn el ili en tiuj sferoj, kie mi havas influon: la internacia gazeto *Monato*, la Akademio de Esperanto, la Komitato de UEA kaj aliaj.

*Dum via 11-jara loĝado en Usono vi certe partoprenis landajn E-kongresojn, vizitis klubkunvenojn. Per kio tiuj aranĝoj diferencas de la nialandaj? Ĉu ekzistas en Usono io simila al niaj someraj tendaroj?*

Mi partoprenis nemulte da esperantistaj aranĝoj en Usono, ĉar ili estas mallong-daŭraj kaj postulas grandajn vojaĝ-elspezojn. Ŝajnas al mi, ke la kluba vivo en Usono estas ne sufiĉe vigla. Io simila al la rusiaj tendaroj estas usonaj-kanadaj renkontiĝoj en Okemo, sed ili estas nur tritagaj. Altnivelaj estas NASK-oj (la "Nord-Amerika Somera Kursaro" de Esperanto), sed ili estas ege multekostaj.

*Kio al vi pleje mankas en Usono el tio, kion vi havis ĉi tie antaŭ la transloĝiĝo?*

Unuavice, la juneco kaj tio bona, kio estas ligita kun ĝi.

*Ĉu vi planas dum proksimaj jaroj viziti Rusion? Se jes, ĉu vi strebos partopreni dum la vizito iun rusian E-aranĝon?*

Se mia edzino Esther kaj mi bonŝancos partopreni en la 90-a Universala Kongreso en Vilnius, ni klopodos viziti Rusion. Se tiutempe

okazos alloga esperantista aranĝo, ni strebos partopreni en ĝi dum kelkaj tagoj. Kaj intertempe mi antaŭguas renkontiĝi kun pluraj rusiaj esperantistoj en la 89-a Universala Kongreso en Pekino.

*Se vi povas havi en Rusio same interesan kaj same salajratan laboron, kiel vi havas en Usono, ĉu vi preferus reveni en Rusion aŭ restus en Usono?*

Oni ne povas eniri en la saman riveron dufoje. Ni sentas nun Usonon kiel nian hejmlandon.

*Kian laboron vi faras kiel E-akademiano? Ĉu la Akademio preparas iun projekton, interesan por pli-malpli vasta tavolo de klera esperantistaro? Se jes, ĉu vi mem partoprenas en la projekto?*

En la Interreta epoko akademianoj multe komuniĝas kaj diskutas. Sed malmulto el tio atingas la publikon. El "soci-utila" agado mi nomu la Akademian Konsultejon (kiu kolektive preparas respondojn al prezentataj subtilaj demandoj) kaj laboron pri la 9-a Oficiala Aldono (kiun faras la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro). Mi estas aktiva ano de ambaŭ akademiaj kolektivoj.

*Ĉu vi provis iam kalkuli (almenaŭ proksimume): a) la suman eldonkvanton de viaj lernolibroj? b) la nombron de ĉiuj viaj E-lernintoj (ĉeestaj kaj korespondaj)?*

Tio estus malfacilaj taskoj.

a) Mia baza lernolibro aperis (krom la unua ĵurnala versio) eble en 50 mil ekzempleroj (eldonejo "Nauka", multobligoj en Ufa kaj en multaj urboj de Sovet-Unio). La ekspres-kurso aperis en la fama scienc-populara revuo *Kemio kaj vivo* en la kvanto 265 mil ekzempleroj plus 3 mil ekzempleroj kiel libreto. *Vojaĝo en Esperanto-lando* aperis en 5500 ekzempleroj. Aldone — modernigitaj versioj de la lernolibroj en Interreto, kiujn elŝutis miloj da homoj.

b) Mian amasan korespondan kurson dum 23 jaroj finis 883

personoj: mi havas plenan liston de diplomitoj kun diplomnumeroj. Pri lernintoj en alispecaj kursoj mi ne havas imagon; nu, almenaŭ 500 personoj. Krome, tre multaj homoj konsideras min sia instruisto, ĉar ili lernis Esperanton per miaj lernolibroj presitaj kaj Interretaj.

*Ĉu vi planas verki kaj aperi novajn librojn? Se jam estas iuj planoj, kiaj libroj tio povos esti?*

Mi havas nur unu planon: aperi ĉe UEA la trian eldonon de *Vojaĝo en Esperanto-lando*, kiu estos eĉ pli alloga ol la dua. Kaj mi havas kelkajn revojn: a) eldoni la modernigitajn versiojn de la lernolibro kaj ekspres-kurso kiel unu libron, lukse grafikumitan; b) prilabori kaj eldoni libroforme mian disertacion *Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto*; c) verki libron pri Ludoviko Zamenhof. *Ĉu vi havis iam ideon ĉesigi vian aktivan E-agadon kaj dediĉi vian liberigontan tempon al io alia?*

Eble mi faros tion post 35 jaroj. Sed tiun tempon necesas ĝisvivi. Statistika esploro, farita en Germanio, montris, ke esperantistoj vivas pli longe ol averaĝaj socioj. Kial do rezigni la eliksiron de longviveco?

*Kiel vi taksas la agadon de Renato Corsetti en la posteno de UEA-prezidanto? Kiu laŭ vi estus la plej bona kandidato por tiu ĉi posteno en novaj elektoj ĉi-somere?*

Renato Corsetti estas la plej demokratia Prezidanto de UEA. Li ne atendas, ke iu skribu al li pri io. Renato mem iniciatas kaj promocias multajn agadojn kaj regule komuniĝas kun miloj da homoj. Vi ne imagas, kiel populara li estas en Brazilo — la lando kun tre dinamisma Esperanto-movado. Mi esperas, ke li reelektiĝos en Pekino por unu plia periodo.

*Kion vi opinias pri ĝenerala stato de la lingvo Esperanto kaj E-movado nun? Ĉu ĝi progresas dum lastaj jaroj?*

Mi trovas la nunan ĝeneralan staton de la movado nemalbona kaj ligas multajn ĝiajn estontajn sukcesojn kun Interreto. Iam Laszlo Szilvasi trafe diris, ke Esperanto kaj Interreto estas kvazaŭ kreitaj unu

por la alia. Tiun proksimecon indas eluzi maksimume.

*Ĉu vi kredas, ke en proksimaj jardekoj Esperanto povas havi esence (almenaŭ kelkoble) pli vastan uzadon ol ĝi havas nun, ke aperos en la mondo kelkoble pli da E-parolantoj ol estas nun?*

Mi lernis la lingvon, kiam ĝi estis 70-jaraĝa. Mi aktivis en Esperantujo dum preskaŭ duonjarcento. Intertempe Esperanto havis multajn sukcesojn en multaj lokoj kaj multaj sferoj (ankaŭ malsukcesoj ne mankis), sed okazis nenio eksterordinara. Kvankam mi rigardas en la estontecon de Esperanto kun optimismo, mi ne esperas vidi revoluciajn ŝanĝojn dum mia restinta vivo. Mi estos ĝoja, se mi eraras.

*Kiel vi rilatas al la konkurenco inter la angla lingvo kaj Esperanto?*

Mi ne vidas konkurencon inter ili. Ambaŭ havas siajn niĉojn, same kiel kelkaj aliaj lingvoj, uzataj en internacia komuniĝo. Anstataŭ batali KONTRAŬ la angla lingvo, estas preferinde labori POR Esperanto: informi, instrui, apliki, kongresumi, verki, legi, skribi, korespondi, kanti, krei esperantistajn familiojn; eĉ iam simple babili pri bagateloj — la lingvo vivas nur en uzado.

*Kiu originala E-beletraĵo pleje impresis vin dum la legado?*

Mia plej ŝatata libro estas *Kredu min, sinjorino!* de Cesaro Rossetti. Mi varme rekomendas ĝin al ĉiuj.

*Ĉu vi povas rememori kaj rakonti iun interesan okazintaĵon el via longa esperantista vivo?*

Mi ja povus rakonti eĉ kelkajn, sed tio trolongigus nian jam sufiĉe longan intervjuon. Prefere mi faru tion iam aparte.

intervjuis Viktoro Aroloviĉ kaj Garik Kokolija

La intervjuo aperis en *Rusia Esperanto-Gazeto* (REGo), 2004, junio, No 3

## Mez-Usona Regiona Konferenco

La Mez-Usona Regiona Konferenco okazis je la 15a de majo. Tiu-ĉi unua tia konferenco okazis en Sankta-Luiso, Misurio. Entute estis 14 partoprenantoj, inkluzive de du infanoj.

Lokaj klubanoj konatiĝis kun kvar gastoj kiuj loĝas en diversaj urboj en Ilinojso; ĉiu persono prezentis sin kaj povis prelegeti pri elektitaj temoj. Ni konatiĝis ankaŭ per babilado dum tagmanĝo (pico) kaj ĝenerale. Nia nova amiko, Bill Mania, Ĉikagano, skribis poste ke nia loka pico estas kurioza kombino kun maldika flano. Tio ja estas unu el la kulturaj malsamĵoj inter niaj du urboj.

Ni aŭskultis informoplenan ĉefprelegon de Duncan Charters pri la stato de la movado tra la mondo, aparte en Eŭropo, kie Duncan lastatempe vizitis diversajn esperantistojn kaj Esperantajn centrojn.

Iom da muziko en Esperanto ni aŭdis, ĉar du-tri partoprenantoj kunportis KD-ojn. Cetere, la du knabinoj kaj ties gepatroj ludis kartludon, "Ursa Familio".

Kiel nia vizitanto Bill raportis: "Poste nia tuta grupo iris kune por marŝi tra parto de Sankta-Luiso, laŭ la strato Delmar. La vetero estis bela kaj ni vidis butikojn kaj homojn kiuj interesis nin. Sur la marŝejo, je ambaŭ flankoj de la strato, estis steloj; ĉiu montris la nomon de fama persono el Sankta-Luiso."

Ni vespermanĝis en bone konata loka restoracio. Poste, por nia distra vespero ni ĝuis malgrandan film-festivalon. Ni spektis kvar aferojn:

- La originalan, iom bizaran fabelon "La eta knabino";
- La skeĉon "La vorta klaso" de Giorgio Silfer, en kiu ĉiuj geaktoroj uzas frazojn nur el la Fundamento de Esperanto;
- Parton de filmo montranta la brazilan lernejon "Bona Espero",

kiun prizorgas gesinjoroj Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia;

Kaj finfine, la klasikan krim-filmon "Angoroj".

Ni en Sankta-Luiso tre ĝojis gastigi niajn novajn geamikojn por la unua Mez-Usona Regiona Konferenco, sed ni kuraĝigas al samideanoj en aliaj mez-usonaj lokoj ekpensi ĉu vi volus okazigi la venontan regionan kongreseton! Taŭgas memori kion ni aŭdis en la saluto de Vilĉjo Harmon, Ĉefdelegito de UEA, Usono: "Mi ĉiam opiniis, ke la regionaj Esperanto-organizaĵoj estas egale firma bazo kiel la lokaj kluboj por antaŭenigi Esperanton. Mi esperas ke via regiona grupo kreskos rapide!"

## JARRAPORTO PRI LA 34A NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO DE ESPERANTO (NASK) 2003

La 34a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazis la duan fojon ĉe la orienta flanko de Usono ĉe la fama Altlernejo de Internacia Trejnado (School for International Training) apud la belega urbeto Brattleboro, Vermonto. Inter 7-25 julio, dudek tri studentoj de ok landoj studis pere de la helpo de tri instruistoj: Spomenka Štimec de Kroatio, Paul Gubbins de Britio kaj Lee Miller de Misurio, Usono. La studentoj venis de Japanio, Kanado, Britio, Danio, Dominika Respubliko, Ĉinio, Usono kaj Aŭstralio, do la etoso estis vere internacia.

NASK 2003 ofertis tri kursniveleojn, de postkomencantoj ĝis progresintoj. Ĉiu kurso donis 3 stud-unuojn. Tim Westover, redaktis la tagĵurnalon, *Naska Fasko*, dum la kursaro. En ĝin Tim enmetis ne nur gravajn informojn pri la kursaro sed ankaŭ verkaĵojn de la studentoj mem. Tim ankaŭ kreis kaj prizorgis retpaĝaron por la

kursaro kiu enhavis partojn de la ĵurnaloj kaj multajn fotojn. Ĝi troviĝas ĉe: <<http://www.medialabinc.net/temp/fasko/NASK2003/index.asp>>. Aldone, Tim verkis raporton kiu aperis en la 2003/4 *Esperanto USA*.

Pro la fakto ke la kursaro komenciĝis tuj post la jarkongreso de ELNA en Bostono, ni ĝuis la muzikon de Kim Jan Henriksen (JoMo). Li muzikis unue ĉe la landkongreso kaj poste ĉe SIT.

Dek tri el la kursanoj ricevis subvencion de la NASK-Studenta Fonduso de ELNA aŭ la Fonduso "Schulze Education Endowment" de la Esperantic Studies Foundation. La "Schulze Education Endowment" estas kreita pere de la heredaĵo de Bill kaj Cathy Schulze por certigi la daŭradon de la someraj kursaroj. ESF ankaŭ subvenciis la kromajn kostojn ne kovritajn per la kurskotizoj.

"The School for International Training" invitis nin denove okazigi la kursaron tie kiel oficialan parton de la somera sesio en 2004. La datoj estas 5-23 julio. Por la unua fojo estas konflikto kun la jarkongreso de ELNA.

Ellen M. Eddy

**Bonvolu ne forgesi, ke ni ankoraŭ (kaj ĝis la fino de oktobro) akceptos proponojn por la jarfina literatura suplemento de ELNA. Ni instigas al ĉiuj membroj, kiuj volas proponi mallongajn prozaĵojn aŭ poemojn, originalajn aŭ tradukajn, proponi ilin al ni ĉe:**

Literatura Suplemento  
ELNA

PO Box 1129

El Cerrito CA 94530

<[donh@donh.best.vwh.net](mailto:donh@donh.best.vwh.net)>

## Volunteer Opportunities with ELNA

*de Anna Bennett*

There is one way in which you can easily help ELNA and Esperanto with little or no effort on your part. Go to the ELNA website at [esperanto-usa.org](http://esperanto-usa.org) ("Local Organizations and Clubs") and check whether there is an Esperantist listed as a contact for your area. Our small group in Boise has a new member thanks to this list. Someone who had been away from Esperanto for a number of years, and decided to get active again, contacted us through this means. You can be that contact in your area! If there is already someone listed for your state, but not in your city, add your name and city to the list! Let the CO know that you would like to make that addition to the list.

As the "Komisiito de Volontuloj" I am responsible for trying to match volunteers with ELNA needs. The requests sometimes are urgent, and it is difficult to find appropriate volunteers from a list that is not entirely current. I often get no response to my e-mail requests. If I receive a notice that an e-mail address is not valid, the solution is to try to make contact by other means, such as a phone call. However, when there is no response, my assumption has been that I am being ignored. It has occurred to me recently, that some of my e-mails are never read. My "spam" filter results in my never seeing my spam e-mail. However, to be sure that I'm not missing important e-mails I do go through the "spam" messages about once a week. Occasionally I find something important. Are you missing some of your e-mails?

If you see a need in our organization and you would be willing to fill that need, please contact Anna Bennett at  
<[annambennett@yahoo.com](mailto:annambennett@yahoo.com)>.

[Inter la militoj, tre populara estis ĉi tiu "Historio de Esperanto" verkita de Izrael Lejzerowicz surbaze de libro bone konata ankaŭ en aliaj lingvoj ...]

### Ĉapitro 1

1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon.
2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi.
3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto.
4. Kaj la Spirito vidis Esperanton, ke ĝi estas bona; kaj la Spirito apartigis Esperanton de Volapük.
5. Kaj la Spirito nomis Esperanton Eterna Tago, kaj Volapükon nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno – unu tago.
6. Kaj la Spirito diris: Estu firmaĵo en la lingvo.
7. Kaj la Spirito kreis tiun firmaĵon.
8. Kaj Li nomis la firmaĵon regula akcento. Kaj estis vespero kaj estis mateno, la dua tago.
9. Kaj la Spirito diris: Kolektiĝu la reguloj gramatikaj en unu lokon, kaj aperu la firma grundo; kaj fariĝis tiel. Kaj la Spirito nomis la firman grundon Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona.
10. Kaj la Spirito diris: La Fundamento kreskigu verdajn, kiu naskas ĝojon, vortaron, kiu donas laŭ sia speco radikojn, kies semoj estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj fariĝis tiel.
11. Kaj la Fundamento elkreskigis verdajn laŭ sia speco: verdant lingvon kaj verdant movadon, vortaron kaj arbon, kiu havas radikojn, kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona.
12. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.
13. Kaj la Spirito diris: Estu lumajo en la ĉiela firmaĵo, por apartigi

Esperanton de mallumo.

14. Kaj ĝi estu lumajo por lumi super la tero; kaj fariĝis tiel.
15. Kaj la Spirito faris la grandan lumajon por regi la mondon.
16. Kaj la Spirito starigis ĝin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ĝi lumu sur la teron.
17. Kaj la Spirito nomis la lumajon Verda Stelo. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona.
18. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.
19. Kaj la Spirito diris: la vortaro aperigu moviĝantaĵon, vivajn estaĵojn kiuj fleksebligis la Lingvon.
20. Kaj la Spirito kreis afiksojn, kiujn aperigis la Vortaro, la sufiksojn kaj prefiksojn laŭ ilia speco. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona.
21. Kaj la Spirito benis ilin dirante: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la vortaron. (Kaj tial afiksoj tiel multiĝas ĝis nun).
22. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.
23. Kaj la Spirito diris: La vortaro aperigu vivajn estaĵojn, brutojn kaj vermojn.
24. Kaj la Spirito kreis la neologismojn kaj ĉiujn malfacilajn vortojn, laŭ ilia speco, por eternal turmento de la novaj verduloj.
25. Kaj la Spirito diris: Ni kreu potencon aferon, kiu respegulos nian internan potencon; kaj ĝi estu la akso de la lingvo kaj ĝi regu ĝian gramatikon.
26. Kaj la Spirito kreis la Akuzativon; en formo de la finaĵo N Li kreis ĝin.
27. Kaj la Spirito diris: fruktu kaj multiĝu kaj plenigu la verdant lingvon kaj regu super ĉiuj ceteraj reguloj de la Fundamento. (Kaj deposed tiam ĉiuj verduloj uzas la akuzativon en troa abundo).
28. Kaj la Spirito diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn regulojn de la Fundamento. Ĝi estu por vi sanktaĵo. Kaj fariĝis tiel.
29. Kaj la Spirito rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.
30. Kaj estis finitaj la Fundamento kaj Radikaro kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj.
31. Kaj la Spirito finis en la sepa tago sian laboron, kiun li faris, kaj li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun li faris.
32. Kaj la Spirito benis la sepan

tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis, legante la originalan literaturon, kiun li faris kreante.

### Ĉapitro II

...

17. Jen estas la generaciario de Ido: Ido havis la aĝon de kelkaj jaroj kaj naskiĝis al ĝi Esperantido.
18. Kaj Esperantido naskis Occidentalton, Idiom Neutral kaj Interlingua.
19. Kaj al ili naskiĝis Neo-Latin kaj Anglic por eternal malhonoro.
20. Kaj multaj aliaj ĝis la nuna tago kaj ĝis la fino de ĉiuj tagoj.
21. Ili ĉiuj vivas efemeran vivon, ĉar ili estis polvo kaj refariĝos polvo.

### Ĉapitro IV

1. Kaj estis unu viro en la lando svisa kaj lia nomo estis Hodler.
2. Kaj la Sinjoro inspiris lin, dirante: arigu la verdulojn el ĉiuj flankoj de la mondo kaj mi faros vin forta kaj universala ligo.
3. Kaj mi benos vian laboron per sukceso kaj prospero, kaj via nomo fariĝos juvelo de l' popolo.
4. Kaj Hektor faris tiel. Li venigis la popolon el ĉiuj flankoj de la mondo kaj faris grandiozan aferon.
5. Kaj li konstruis la verdant Sanktejon kaj enirigis en ĝin ĉiujn justulojn, kiuj trovis plaĉon el la okuloj de l' Sinjoro. Kaj la sanktejon li nomis universala verda asocio, kaj ĝi fariĝis la templo de ĉiuj verduloj.
6. Kaj li konstruis ĝin tiel: ĉiu verdulo, venanta en la templon, devis kontribui sian monoferon kaj la ĉefpastro absolvas lin el ĉiuj pekoj.
7. Nur la plej piaj pilgrimis al la sanktejo, la ceteraj starigis inter si en ĉiu loko pastrojn kaj helppastrojn, kiuj preĝis pro ili.
8. Kaj ĉiujare la templanoj ricevadis la preĝlibron.
9. Kiel firma Roko restis tiu templo ĝis la nunaj tagoj kaj ĝis la fino de ĉiuj generacioj.
10. Kaj la graco de l' Sinjoro ripozas sur ĝi, kaj al ĝi estas turnitaj la okuloj de la tuta verda mondo.
11. La patriarko Jakob (Hans) estas starigita tie kiel ĉefpastro kaj li vekas en la verda popolo piecon kaj oferemon.
12. Kaj kiun li ne povas konverti per la preĝlibro, li varbas per premio.

## NEW FROM THE BOOK SERVICE

